XXI ORDINARA TEMPO – 22-an de aŭgusto 2010

KAJ ONI VENOS EL ORIENTO KAJ EL OKCIDENTO KAJ SIDIĜOS EN LA REGNO DE DIO. -Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk 13,22-30

Kaj li iris tra urboj kaj vilaĝoj, istruante kaj irante ĉiam pluen al Jerusalem.

Kaj iu diris al li: Sinjoro, ĉu malmultaj estas la savataj? Kaj li diris al ili: Strebu eniri tra la mallarĝa pordo; ĉar multaj , mi diras al vi, deziros eniri kaj ne povos.

Kiam la dommastro leviĝos kaj ŝlosos la pordon, kaj vi komencos stari ekstere kaj frapi sur la pordon, dirante: Sinjoro, malfermu al ni; kaj li respondos kaj diros vi : Mi ne scias, de kie vi estas; tiam vi ekparolos ; Ni manĝis kaj trinkis antaŭ vi, kaj sur niaj stratoj vi instruadis; kaj li parolos, kaj diros al vi: Mi ne scias de kie vi estas; foriru de mi, ĉiuj farantoj de maljusteco.

Tie estos la plorado kaj la grincado de dentoj, kiam vi vidos Abrahamon kaj Isaakon kaj Jakobon kaj ĉiujn profetojn en la regno de Dio, kaj vin mem forpelitaj eksteren.

Kaj oni venos el oriento kaj el okcidento, kaj el nordo kaj el sudo, kaj sidiĝos en la regno de Dio. Kaj jen la lastaj, kiuj estos unuaj; kaj estas unuaj, kiuj estos lastaj.

Jesuo renversas la komunan doktrinon laŭ kiu Izraelo saviĝas kaj la paganoj ne kaj anoncas iun ŝanĝon de valoroj. Ni vidu en la 13-a ĉapitro de la Evangelio laŭ Luko de versiklo 22 al 30, la instruon de Jesuo.

Kaj li iris tra urboj kaj vilaĝoj, istruante , Jesuo instruas la novaĵon de la bona sciigo de la Dia regno, *irante ĉiam pluen al Jerusalem.* Jesuo havas nun jam la intencon iri al Jerusalemo por kolizii kun la povhavantoj, tiuj kiuj manipulis pro sia specifa utiligo kaj konsumado la bildon de Dio, ĝin misformante.

Kaj iu diris al li: Sinjoro, ĉu malmultaj estas la savataj? La savo estis konsiderata privilegio de Israelo, de la elektita popolo, je malprofito de la paganoj. Tiam tiu persono demandas: *Kiom da estas tiuj kiuj saviĝos?*

Sed Jesuo ne respondas pri kiom estas tiuj kiuj saviĝas, sed pri tiuj kiuj saviĝas: "*Strebu eniri tra la mallarĝa pordo; ĉar multa , mi diras al vi, deziros eniri kaj ne povos.*

Ĉi tie la evangeliisto ne prezentas Jesuon kiu proponas modelon de asketismo, de rezigno, de kiu scias kiuj oferoj. Se multaj ne sukcesos eniri tra tiu pordo mallarĝa, ne estas ĉar estas malfacile trairi, koste de kiu scias kiaj rezignoj, kiu scias kiaj humiliĝoj aŭ oferoj, sed ĉar la pordo estos ŝlosita.

La eraraj elektoj farataj dum la vivodaŭro malebligos la aliron al tiu vivopleno. Estas tio kion la evangeliisto volas diri al ni. Do ne estas malfacile trairi, sed eltrovi tiun mallarĝan pordon kaj se multaj ne sukcesos tien eniri estas ĉar ĝi estos ŝlosita.

Fakte, diras Jesuo, *Kiam la dommastro leviĝos kaj ŝlosos la pordon, kaj vi komencos stari ekstere kaj frapi sur la pordon, dirante: Sinjoro, malfermu al ni;*

Do ili konas la Sinjoron, konas Jesuon, kaj Jesuo respondos: "*Mi ne scias de kie vi estas*", tio estas "mi ne konas vin". Do tiam tiuj komencis pretendi iun ekskluzivan rilaton kiun ili havis kun Jesuo: "*Ni manĝis kaj trinkis antaŭ vi*", aludo al Eŭkaristio, "*sur niaj stratoj vi instruadis*" la akcepton de lia mesaĝo, sed ili pretendasi iun ekskluzivan rilaton kun Jesuo per ĉiuj agadoj adresitaj al la Sinjoro kaj per neniu adresita al la frataro.

Jen kial Jesuo respondas: "*Mi ne scias de kie vi estas;* tio estas "mi ne konas vin". Jesuo konas tiujn kiuj metas sian vivon je la servo de la alies bono, je la servo de la aliuloj. Ne gravas por li tio kio estas farata por li, sed tio kio kun li kaj kiel li estas farata por la aliaj.

Jen kial, citante iun psalmon, la psalmon 6, versiklon 8, "*Malproksimiĝu el mi, vi ĉiuj laboristoj de maljusteco".* Do tiuj, kiuj, eĉ manĝinte kaj trinkinte kune kun Jesuo, do aludo al Eŭkaristio, tiuj kiuj aŭskultinte la instruon poste ne ĝin tradukis al sinteno de vivo por la aliuloj, la Sinjoro ne ilin konas.

Ne sufiĉas manĝi Jesuon, kiu estas pano, necesas iĝi pano por la aliaj.

Kaj Jesuo diras:" *Tie estos la plorado kaj la grincado de dentoj,* tipa dirmaniero kiu indikis la fiaskon, la konstaton de la malsukceso de propra ekzisto, "*kiam vi vidos Abrahamon kaj Isaakon kaj Jakobon kaj ĉiujn profetojn en la regno de Dio, kaj vin mem forpelitaj eksteren."*

Ili kiuj pensis havi la privilegion esti la elektita popolo kaj esti pro tio allasataj en la Dian regnon, ĝuste pro ilia sinteno estos de tie forpelitaj. Sed ne nur! Dum la elektitoj estos forpelitaj, tiuj kiuj estis la ellasitoj iĝos la elektitoj. Fakte, konkludas Jesuo: "*Kaj oni venos el oriento kaj el okcidento, kaj el nordo kaj el sudo"* tio estas de la tuta pagana mondo*, "kaj sidiĝos en la regno de Dio."*

Do Jesuo renversas la komunan doktrinon laŭ kiu Israele saviĝos kaj la paganoj ne, kaj la regno de Dio malŝlosatas por ĉiuj kiuj metas sian vivon je la servo de la alies bono. Do Jesuo ne dirstingas paganojn aŭ aliajn kategoriojn, sed lia invito al la bona novaĵo estas adresita al ĉiuj.

Kaj poste la konkludo: "*Kaj jen la lastaj"* tio estas tiuj kiuj estis ellasitaj, *"kiuj estos unuaj; kaj estas unuaj,"* tiuj kiuj estis la elektitoj, *"kiuj estos lastaj".*

Kaj poste la evangeliisto daŭrigos "*En tiu sama horo alvenis iuj Fariseoj*" jen, la unuaj kiuj iĝas la lastaj, alproksimiĝas al Jesuo.